Ateismo

Bulteno de la Atea Tutmonda Esperanto Organizo

http://www.gazetotekolanti.com/ateo/a10.pdf



№ 10

Junion de 2010

Redaktore

Nova jaro, nova vivo, diras fama dirâĵo.
Tio ne estas *ekzakta* je nia kazo, sed evidentiĝas kelkaj formalaj ŝanĝoj ĉe nia bulteno. Eble ĝi estis pli bela antaŭe, sed kvankam mi klopodos atingi denove tiun normon de plibeleco, mi devas sciigi, ke mi ne plu povas daŭrigi la antaŭan manieron komposti la bultenon pro etikaj kaj praktikaj kialoj:

Etikaj: Ĝis nun mi povis uzi vindozan programon PageMaker 7.0, ĉar mia lernejo aĉetis ĝin kaj min rajtigis uzi, same kiel programo Adobe Acrobat, per kiu mi kreis la pdf-an version, kiun ni vidas en interreto, kaj kiun printisto uzis por multobligi ĝin surpapere. Tion mi ne plu povas fari ĉar mi ne plu laboras por tiu lernejo, kaj mia nova lernejo ne posedas tiun softvaron.

Evidente, mi povus proponi al estraro de ATEO, HALE aŭ MEL (organizoj esperantaj kies bultenojn mi kompostas) aĉeti ĝin kune aŭ unuope, kaj fakte mi jam petis tion al antaŭaj estraroj de la du unuaj, sensukcese pro sama kialo: manko de mono. La permeso uzi tiujn programojn samkostas la kotizojn de 234 anoj de ATEO: PageMaker nun nomiĝas **InDesign CS4** kaj kostas 976 eŭrojn, **Acrobat** nun kostas €401.35, kaj **Photoshop CS4**, €976.35, kio entutas 2 354 eŭrojn. Kaj tio ebligus min nur komenci labori, ĉar printado kaj sendado posta kostas monon. Mi neniam konsideris piratecon, ĉar mi ne rabas librojn, kiujn mi devas legi, do mi ne rabu ilojn, kiujn mi devas uzi. Ne estus etike. Kaj ateismo senetika estas nenio.

Ankaŭ, eĉ se ni havus la monon, pagi tiun kvanton estus, laŭ mia kompreno, neetika. Ĉefe pro tio, ke ekzistas senpagaj alternativoj.

Praktikaj: ***PageMaker*** ne komprenas utf-8-n, kaj sekve mi devis uzi Latin3-n. Mi devis unue komposti la paĝojn de la bulteno kaj poste traduki de

Latin3 al utf8 por retumi ilin.

La kosto de tiuj programoj estas praktika problemo, krom etika.

Solvo bona estas uzi la programojn, kiujn venigas al ni **Linukso**, operacia sistemo tiom senpaga kiom ili: anstataŭ PageMaker, mi uzas **Scribus**, kiu kostas 0 eŭrojn, kaj ankaŭ ĝi povas krei pdf-ajn dosierojn, kio ŝparigas al ni aĉeti *Acrobat*-n mem, kaj fotojn kaj bildojn mi prilaboras pere de **GIMP**, same senpaga anstataŭulo de Photoshop.

Kompreneble, facileco ne estas sama, sed iom post iom la rezulto estas same bulteno, kiun vi nun legas. Iom post iom mi lernos fari ĝin pli bone per tiuj ĉi novaj iloj, kiujn mi nun ekuzas, kaj eble iam la rezulto estos eĉ pli brila ol tiuj, kiujn mi sukcesis fari per luksaj rimedoj pagaj kaj multekostaj. Sed ni notu, ke Linukso, same kiel Esperanto, estas posedaĵo de ĉiu homo, ne de riĉuloj, kiel Bill Gates aŭ posedantoj de Adobe, kies granda riĉeco pligrandiĝas per la laboro de malriĉuloj kiel ni.

Lastan praktikan kialon mi menciu: **Scribus** komprenas kaj traktas bone utf-8an tipokodigon, kaj sekve oni povas sendi jam al mi siajn verkaĵojn por publikigo kun supersignoj! Se oni ne povas ilin produkti, oni povas tamen uzi la ikso-kodon aŭ eĉ Latin3-an kodon, sed notu, ke ĉe http://www.esperanto.mv.ru/UniRed/ENG/ troviĝas senpaga tekstilo, per kiu oni povas produkti ĉapeligitajn tekstojn per vindoza sistemo. Tiujn tekstojn mi povas ankaŭ uzi per miaj "novaj" programoj. Bona sekvo estas, ke ni jam povas uzi ĉiun ajn litertipon en nia bulteno.

Mi atendas viajn novaĵojn kaj komentojn ĉe liberpenso@gmail .com.

Altestime via,

Jesuo



Rimarku, ke pingveno estas simbolo de Linukso, same kiel la verda stelo estas simbolo de Esperanto.

Parolas la prezidanto

Jen la unua el la du numeroj planitaj en 2010. Mi tiuokaze sendas varman dankon al la kontribuintoj.

Mi trarigardis la adresarojn de la abonintoj, kunvenintoj, membroj k.s. de la lastaj jaroj, kaj mi konstatis ke homoj kiuj aktive interesiĝas pri ateismo kadre de la esperantista movado, troviĝas (laŭ tiuj datumoj) en ne malpli ol dudeko da landoj.

Mi invitas ĉiujn profiti de tiu diverseco por starigi necesan debaton inter vi kiuj, ĉar nekredantoj aŭ liberpensuloj, evidente havas multon komunan en viaj vivkonceptoj, sed cetere ne ĉiam, almenaŭ ne ekzakte same komprenas kelkajn nociojn kaj vortojn. Mi jam konstatis ke laŭ la landoj kaj la kontinentoj, la vortoj "religio", "ateismo", "laikeco" estas tre diverse komprenataj inter homoj kiuj volonte deklaras sin nekredantoj (povas esti ke sama fenomeno estus konstatebla inter dikredantoj). Tial nia revuo plezure akceptos viajn kontribuojn en tiu debato. Legado de tekstoj el aliaj landoj, el aliaj socioj, estos profita al ni ĉiuj, ne nur por larĝigi nian personan vidpunkton, sed ankaŭ por akrigi niajn argumentojn.

Cetere tiu diverseco estas bela deirpunkto por ke nia asocio intervenu pozitive, kaj ke ties agado ne limiĝu je kongresa kunveno (nu unika okazo renkontiĝi), kaj eldono de po du numerojn jare. Ĉiu el vi povas utile agadi en propra lando, ĉu kadre de ateisma medio por diskonigi Esperanton, ĉu kadre de esperantista medio por diskonigi se ne ateismon, almenaŭ nian asocion ATEO, tiel farante "du batojn per ununura ŝtono" (pardonon, eble franclingva esprimo).

Tio estas la senco de nia intenco aperi inter subtenantoj de la kreado de Internacia Asocio de la Liberpenso, okaze de la venonta internacia kongreso de la Internacia Humanista kaj Laika Unio (IHEU) en aŭgŭsto 2011, en Oslo en Norvegio.

Fine, nia revuo povas esti efika tribuno por lanĉi novajn projektojn, ideojn, proponojn de agado, k.s. Ŝajnas ke multaj situacioj rapide evoluas momente en pluraj landoj (jen negative jen pozitive) koncerne ekzemple la sintrudiĝon de la religioj en politikajn aferojn, en la edukadon ktp ..., Ie-tie bedaŭrinde regresoj videblas, dum aliloke novaj rajtoj aperas (ekz. aborto-rajto, disigo de religio kaj edukado). Mi deziras citi nur unu ekzemplon kiu certe nin ĉiujn ĝojigos: oficiala disigo de la religio kaj de la ŝtato en Bolivio, kiu tiel fariĝas nova laika lando.

Bonan legadon de tiu ĉi deka numero, kaj efikan agadon por ateismo.

Christian Rivière

Alvoko por Internacia Asocio de la Liberpenso

La 4-an de julio 2005 en Parizo, kadre de internacia kongreso de IHEU, la franca Federacio de la Liberpenso iniciatis tutmondan kongreson en kiu 250 ĉeestantoj el 29 landoj, debatis pri la necesa agado de la Liberpenso.

Veninte el ĉiuj kontinentoj, ili konjektis ke necesas kolektive finopunkti la disecon de la asocioj el diversaj landoj kiuj, tra la mondo, sin proklamas liberpensaj aŭ ateistaj.

Fakte, la nepre necesa batalo por la disigo de la religioj kaj de la ŝtatoj, eĉ se formale nacia, havas nenegeblan karakteron internacian pro la politikaj kaj filozofaj principoj kiujn ĝi starigas.

La batalo por la triumfo de totala libereco de konscienco ne povas esti sen enkonstitucia postulo de plena kaj entuta disigo de la publika sfero kaj de la religioj. Tiu filozofa movado fontis el la jarcento de la Klerismo kiu montris la vojon al la mondo.

Dum pli ol du jarcentoj, la Disigo ekestis en Usono kaj etendiĝis al Meksikio, al Francio, al Sovetio, al Turkio kaj al pluraj aliaj landoj kiel en Hispanio en 1931. Tute ne malfortiĝante, malgraŭ multaj malfacilaĵoj, tiu historia movado de emancipo de la konsciencoj kaj de la popoloj plu etendiĝas.

Freŝdate, viciĝis Nepalo kaj Bolivio en plenumo de tiu liberiga ago.

Inspirite de tiu ideo la 250 ĉeestantoj de la tutmonda Kongreso de la Liberpenso en 2005 proklamis la fondon de la Internacia Komitato de Kunligo de la Ateistoj kaj de la Liberpensuloj (CILALP).

De tiu dato, la CILALP komencis agi. Interŝanĝoj okazis, interalie per interreto. Dufoje la CILALP kunvenis: la 4an de junio 2008 en Washington-DC, kaj en Londono la 7an de junio 2009.

Dufoje la diversaj ĉeestantoj konfirmis sian konsenton por ke estu decidita la bazo de fondado de nova Internacia Asocio de la Liberpenso. Ili decidis ke la plej trafaj momento kaj loko por tio estos sendube, la venonta

internacia kongreso de la Internacia Humanista kaj Laika Unio (IHEU) en aŭgusto 2011, en Oslo en Norvegio.

Tial, sin apogante sur tiu denova mandato, la subskribantoj de tiu alvoko adresiĝas al ĉiuj samideaj asocioj tra la mondo por firme antaŭeniri al tiu celo.

La subskribantoj alvokas ilin por ke ili esprimu sian opinion pri la jenaj demandoj:

1- Ĉu vi estas interesataj de la Fondo de Internacia Asocio de la Liberpenso?
2- Ĉu vi konsentas membriĝi al la Tutmonda Kongreso de la Liberpenso kiu ekfondos ĝin en aŭgusto 2011 en Norvegio?
3- Ĉu vi deziras aktive partopreni la Komitaton de preparado de tiu tutmonda Kongreso?
4- Ĉu vi volas esti regule informitaj pri la stato de la laboro?

Besson Philippe, Blondel Marc, Lafouge Jacques, Eyschen Christian, Lepeix Roger, franca Liberpenso; Boroiu Nicolae kaj Tudor Marian, Ozon-Iancu, Asocio por Emancipado de la Laboristoj de Rumanio; Cloutier Bernard, Humanista Fondumo de Kebekio, kaj Hodgkinson Jean, Liberpensulo de Toronto, Ontario, Thain Richard G.L, Liberpensulo, Robyn Johannés, Prezidanto de Unio de Ateistoj Kanado; Igwe Léo, Humanisto, Niĝerio; Estrella T. Hugo, Prezidanto, Center for Inquiry - Italio, Humanisto Argentinio; Goeringer Conrad, American Atheists, Usono; Gousseva Julia, Centro de edukado kaj de esplorado Praxis, Rusio; Johnson Ellen, Executive Director, Enlighten The Vote, Usono; Laxalte Terra Elbio, Liberpensulo, Uruguajo; Liddle Terry, Freethought, kaj Mc Arthur Ed, Freethought, History Research Group, Porteous Wood, Keith, National Sécular Society, Britio; kaj Moll Shirley kaj Petersen Steve, Ateisto Minnesota, Usono.

La kanto de Dio

Ĵus venas mi el *sankta* koncerto plurvoĉa en preĝejo, kaj min ŝokis la fakto, ke oni ĝoje, eĉ amuze, petis Dion, ke li *pardonu* onin, ke li *havu kompaton* al oni.

Nu, mi estis tie nur ĉar filino mia kunkantis tie, sed tio ne malhelpis min kompreni, ke la unua frazo, kiun mi aŭdis, pensigis min pri la absurdo de ĉio tio: *Sinjoro, kompatu al ni* ("Lord, have mercy on us!").



Aldone, la kantojn oni vortumis en la angla, ĉar temis pri *Gospel* (Evangelio, en la angla), kaj oni jam scias, ke la lingvaĵo de tiu dubinda artoformo estas la angla, komuna lingvo de nigruloj, kiuj kreis tiun kantomanieron, kiam ili ankoraŭ estis ĵus venigitaj sklavoj en tiaman Usonon el diversaj partoj kaj triboj de Afriko. Sed mi ne povis ne demandi mion, ĉu la ĉeestantaro komprenas la kantojn..., kaj evidentiĝis al mi, ke tute ne.

La kantistoj, ĉar temas pri muzike altnivela ĥoro, kiuj regule koncertumas en mia urbo, estis perfekte liberaj blankuloj, kiuj zorgis imiti nigrajn gesklavojn per siaj kantoj, krioj kaj eĉ gestoj.

Tamen, mi komprenis, ke tio estis malgranda absurdo, rilate al kadro, kie tio okazis: konstruaĵo, kiun oni faris por peti de iluzia estaĵo, ke li zorgu pri tio, kion oni mem devas prizorgi ĉiam: feliĉo kaj kunvivado.

Jesuo

Kiuj estis la fratinoj de Jesuo?

Koncerne la fratojn neniu problemo, la biblio estas tre klara:

«Ĉu Maria ne estas lia patrino, ĉu Ĵako, Jozefo, Simono kaj Ĵudo ne estas liaj fratoj? Kaj ĉu liaj fratinoj estas ne iuj inter ni?» (Mateo 13-55).
«Ĉu li ne estas la filo de Maria, la frato de Ĵako, Jozefo, Ĵudo, Simono? Kaj ĉu liaj fratinoj ne estas ĉi-tie, inter ni?» (Marko 6-3). (Du tekstoj, preskaŭ identaj..., kiu plagiatis kiun?)

Ni aŭskultu Markon kaj Mateon nun:
«Jen, via patrino kaj viaj fratoj estas ekstere kaj petas vin.» (Marko 3 -32).
«Lia patrino kaj liaj fratoj estas ekstere kaj deziras alparoli lin» (Mateo 12 -46).

Denove du tekstoj preskaŭ identaj. Kiu plagiatis kiun?

Kion diras Luko kaj Johano?:
«La patrino kaj la fratoj de Jesuo venis al li» (Luko 8-19).
«Ili malsupreniris al Kapernaumo kun sia patrino, siaj fratoj kaj disĉiploj» (Johano 2-12).
«Kaj liaj fratoj diris al li...» (Johano 7-3).
«Ĉar eĉ liaj fratoj ne plu kredis je li» (Johano 7-5).
«Kiam liaj fratoj supreniris al la festo...» (Johano 7-10).

Kaj cetere :
«Ŝi naskis sian unuan filon...» (Luko).
Sed Jozefo ne konis ŝin (Marian) ĝis ŝi naskis filon kiun ŝi nomis Jesuo (Mateo 1-25).

Laŭ kelkaj aŭtoroj, la fratoj de Jesuo retroviĝis inter la dek du apostoloj. Pri liaj fratinoj, ili postlasis malmultajn spurojn, tiom en la Malnova kiom en la Nova Testamento kaj povus esti Maria kaj Salomeo.

Jean MARIN

jmarin_93hotmail.com

PS: Mi antaŭdankas la legontojn kiuj povus alporti precizigojn pri la fratinoj Jesuo: Kiuj estis Maria kaj Salomeo?

La kampanjo de Dawkins

aŭtoro de libro kun titolo **La dia paranojo**, *ankoraŭ ne esperantigita*

En multaj landoj tra la mondo: Aŭstralio, Aŭstrio, Kanado, Finnlando, Germanio, Nederlando, Italio, Kroatio, Hispanio, Svedio, Britio, Hindio, Usono, estis organizitaj kampanjoj sub la titolo: *Probable ne ekzistas dio.*

Ĝi celis per tiu slogano popularigi la liberpensadon kaj pledi por la sekuraligo de ŝtatoj. Almenaŭ en Svislando estis en kelkaj urboj malpermesata la afiŝado en publikaj trafikiloj. Tial turneis private luitaj busoj por lanĉi debaton pri religio.



Tiun ĉi eviteblan debaton provokis la ĉefa tezo de Dawkins pri la *Probableco de dia ekzisto.* Alpafis tiun *kalkanan tendenon de Aĥilo* senprokraste fundamentistaj eklezioj, kiuj sekvis la buson de probabluloj por propagandi la ekziston de eternulo. Pri la rezulto kaj efiko de ambaŭ tendaroj ne eblas statistiki. En la lastaj jaroj nur malmulte kreskis la nombro de senreligiuloj en Svislando: nur ĉirkaŭ 10 % sin deklaras en ŝtata popolnombrado "sen konfeso de religio".

Kiel amuza sed, laŭ mia opinio, senefika parodio aperis satiraj eklezioj *La fluganta spagetomonstro*, la nevidebla rozkolora unukornulo, pastafarianismo, skarlatruĝa litero A kaj aliaj. Laŭ ne fidindaj fontoj jam ekzistas pli ol 10 milionoj da kredantoj.

Nepre estas tamen blasfemi pri la kreinto de nia lingvo —kaj kondamni lian preĝon sub la verda standardo. Jam la unua linio estas tute religia. Tutcerte nek ekzistas senkorpa mistero nek kredo en la koro. Kial estis malpermesata nur la deklamado de lasta strofo?

Antaŭen ni marŝu —sen dio sed ja por homara celo— Novan homan poemon verku ni ATEO-anoj!

Dieter Rook

Klerikala influo sur la itala socio

Apenaŭ vi naskiĝas, oni akvumas vian kapon per malpura benita akvo, dum vi eligas la unuajn ĝemetojn, por sekurigi vin kontraŭ la ĝenaĵoj de antaŭtempa morto: eterna kondamno al Limbo. Tion, kio estas Limbo, nur sorĉistino povus pli-malpli difini.

Dum jaroj, apenaŭ oni kapablas legi kaj skribi, vi rekrutiĝas en la katolika armeo, antaŭe partoprenante en la komuna manĝo de la korpo kaj sango de Kristo, poste per speciala vangofrapo fare de episkopo, vi fariĝas militisto laŭ ĉiuj aspektoj en la kristana armeo.

Ĝustatempe, venkante katekisman konkuron en la jubilea jaro 1950, mi estis akompanata al Romo por ricevi la altan honoron kisi la manon de la tiama Papo Pio XII[a]. Ne kontentaj pro tio, vidinte la plej bonajn premisojn, iuj konvinkis mian patrinon por ke mi min dediĉu al la eklezia kariero; tri jarojn mi travivis en dioceza seminario kun relativa religia endoktriniĝo, sen nenia ebleco de rezigno, ĉar la lernejo ne estis agnoskita. Pro tio, por forlasi ĝin mi antaŭe devis akiri la mezlernejan finekzamenon.

Prudente danke al tiu maturiĝa periodo mi sukcesis solvi por ĉiam la religian problemon, ĉar nur per rekta kontakto kun eklezia medio oni povas malkovri la difektojn, maltaŭgecon kaj pretendojn de absurda kaj neakceptebla superrealo.

Mi kredis solvi por ĉiam la religian problemon per interrompo de la ritaj rilatoj, sed neantaŭvidita afero min implikis kaj lumigis pli kaj pli, se ĝi

bezonus. En 1960 mia patrina avo decidis traveturi Atlantikan Oceanon, elvenante el Los Angeles, por sekuriĝi per beno, ante mortem, eĉ de Patro Pio el Pietrelcina, kies sankta famo jam disvastiĝis en la tuta mondo. Apenaŭ dudekjaraĝa, mi estis devigata nevole enkoloniĝi laŭ la vico de aspirantoj al konfeso ĉe Lia Sankta Moŝto. Kiel preparo al ricevo de la altvalora sakramento, sacerdoto kun okuloj larmantaj kaj flankigita de du monaĥoj, eliris el konfesejo. Estis mia vico. Kio okazos al mi? Riske mi eniris en malhelan angulon, kie atendis min senkarna vizaĝo kun du enketantaj okuloj, ĉirkaŭataj de densa blanka barbo, signo certa pri saĝeco kaj sankteco.



"De kiam vi ne konfesas?", estis la abrupta kaj formala demando. Mia respondo senruza kaj plena je espero de mirakla savo: "Mi ne konfesas plu, ĉar mi estas ateisto". Mi tiel altiris la koleron de la dia justeco esprimata per la sekvaj vortoj: "Foriru, vi havas la diablon en la korpo!"

Imagu mian animstaton, atakatan de kaverna voĉo, kiu ŝajnis elvenanta el infero, kaj al kiu mi min turnis kun plena bonfido. Mi esperis ke sanktulo tiustatura realigos la miraklon de mia konverto; nu, jes, li nuligis por ĉiam ĉian duban ombron en mia juna menso.

Alia rendevuo kun patrinoeklezio okazis je mia edziĝo. Mia kunulino nepre ne povis kaŭzi al siaj gepatroj kaj parencoj grandegan ĉagrenon per civila geedziĝo. Pro tio, malgraŭ ke ili konis mian

senreligion, eĉ du sacerdotoj ĉeestis je la ceremonio, rabatante pri la kutimaj proceduroj: nenia konfeso kaj sekva komunio. Bonŝance, jam geedziĝintaj, ni decidis ne naski, tiamaniere evitante sekvon da problemoj rilataj al la religia edukado de gefiloj.

Dum mia laborokupo ĉe Poŝta Administracio, responsanto pri loka oficejo, mi nepre provis alporti modestan kontribuaĵon al sekularigo de publikaj medioj per forporto de krucifiksoj pendigitaj ĉe la muro antaŭ la tablo de giĉeto. Mi devas rigardi min tre bonŝanca, ĉar mi ne altiris sur min denuncon fare de vigla piulo.

* * *

La romkatolika apostola eklezio kondiĉis ekde sia komenco, kaj daŭrigas kondiĉi nune konstante obstine la vivojn politikan, socian, sciencan kaj ekonomikan de la itala ŝtato. Ne irante tro malantaŭ en la tempon, sekve de la Konkordato de la 11-a de februaro 1929 pro merito (aŭ mal-) de Duce Mussolini, oni finis la juran konflikton starigita de Leĝo de garantioj de 1871, kiu decidis liberan agadon de la Eklezio en libera ŝtato, kiu tamen agnoskis ĝian absolutan superregon inter la aliaj religioj; pro tio ĉiuj publikaj oficejoj ekde tiam estas ornamitaj per deviga krucifikso, malgraŭ la religia libero.

Post la sperto de la faŝisma reĝimo, kies ĝi estis portanta kolono, la roma eklezio rekaptis plenan povon per reĝimo demokristana. Naskita pozitive de siaj unuaj honestaj politikistoj, la Demokristana partio kreis firman reĝimon aferan kaj klientan, kiu furiozadis dum multe da jardekoj ĝis unuaj 90 jaroj, kaj kun komplicec o de la maldekstra socialismo, estigis grandegan publikan ŝuldon, kiu ĝis nun kondiĉas la vivon de la itala ŝtato.

Forstrekita kiel politika partio

fare de "mani pulite", Demokristana partio serĉis lokon dekstren, centren kaj maldekstren, kaj sukcesis radiki pli kaj pli trudeme, kiel argonaŭto kun mil tentakloj, en la tuta politika arko, lasante senvundaj nur kelkajn sensignifajn pecojn de la itala politiko (radikaluloj kaj ekstrema maldeks tro).

Dum la ora periodo de la demokristana reĝimo, romeklezio bonŝance vane kontrastis kontraŭ referendumoj favoraj al divorco kaj aborto, kies manko kaŭzis tiom da viktimoj, precipe inter la plej malriĉaj klasoj de la socio. Malgraŭ tio, kuraĝigita de la nuna influo sur la berluskona regado, eĉ nun atencas la pasintajn konkerojn per novaj proponoj pri divorco kaj aborto.



Tute kontraŭa al biologia testamento, kiu lasas ĉiujn liberaj disponi pri propra korpo je la fino de vivo, ĝi sukcesis influi la nunan registaron filoklerikalan por emani leĝon limigan de la individua libero.

Papo Benedikto XVIª invitas katolikajn farmaciistojn ne disdoni medikamentojn kiuj influas naturan vivon (pilolo RU486, t.d. de la posta tago, kondomoj ktp), malobservante leĝajn decidojn, kiuj devigas publikajn dungitojn disdoni kuracajn helpojn al ĉiuj petantoj.

Antaŭnelonge romeklezio rebatis neceson de ordinara instruado de la katolika religio en ĉiuj lernejoj, fare de fidindaj docentoj, kun senbaza tromemfido esti la deponprenanto pri la edukado de la

novaj generacioj, repuŝante proponon pri enkonduko de mahometana religia horo.

Justeca instanco pri politikaj krimoj: Romeklezio akiras eminentajn subvenciojn por privataj lernejoj kaj klinikoj, forprenante monon de publikaj institucioj. Krome la instruado de la religio (katolika) en ĉiaj lernejoj konstituas baran ĉeeston, kaj multekostan ekonomian pezon; oni estigis ankaŭ flankan karieron de instruistoj pli facilan, ol tiu de ĉiuj aliaj, al kiuj oni konfidis instruobjektojn programajn kaj pli pezajn kaj respondecajn.

Sen paroli pri la skandaloj de IOR, kiu protektis ĉiajn misagojn, kion mi diru pri la financa situacio de romeklezio, kiu profitas de 8‰ de la ŝtataj enspezoj?; kaj ke la ŝtato rezignas enkasigi la ICI ŝuldatan pro la eklezia nemoveblaĵo?

Laŭ mia opinio, Eklezio devus redesegni sian ĉeeston en la media mondo, preferante informan manieron pli atentan al atesto ol al esprimo de politika pozicio. La katolikaj civitanoj, disaj en ĉiuj partioj, farus elektojn laŭ konscienco, kontribuante al estigo de aŭtentika laika socio, respektoplena de ĉiuj religioj, sed samtempe nepre tute sen klerikala influo.

Pino Lalli (Italio)

La fundamentistoj progresas ankaŭ en Eŭropo. Ne nur musulmanaj integristoj, sed ankaŭ kristanaj integristoj. En Usono, tiuj ĉi ne plu hezitas agresi, minaci je morto la kuracistojn kiuj praktikas Memvolan Ĉesigon de Gravedo.

Taslima Nasreen
Verkistino



Universalaĵoj de religio

Same kiel ekzistas universalaĵoj por la lingvoj (trajtoj komunaj al ĉiuj lingvoj)* same ekzistas universalaĵoj ĉe religioj:

1- Submetiĝo senkondiĉa kaj nediskutebla al:
a)Unu libro: Biblio, Torao, Korano...
b) Unu "persono" (Dio, Alaho, ktp),
c) Pli-malpli al tradicio, kutimo, rito: (Ekz.: ekscizo, cirkumcido, poligamio...,), kiu sin pravigas je la nomo de la religio.
2- Espero de rekompenco, kaj timo de puno:
a) En alia "mondo": infero aŭ paradizo kristana, islama...
b) En alia vivo (metempsikozo budhisma).
3- Submetiĝo al specialaj vestoj kaj kapvestoj: vualo, "kippa", turbano (Sihoj), roboj, sutanoj: nigraj ĉe la kristanaj pastroj, blankaj ĉe la imamoj, oranĝkoloraj ĉe la budhistoj...
4- Solenaj ceremonioj:
a) Kolektivaj: diservoj katolikaj, protestantaj, judaj, islamaj, budhaj...
b) Individuaj: bapto, edziĝo, entombigo...
5- Specialaj lokoj por la diservoj: preĝejoj, temploj, moskeoj, sinagogoj, monaĥejoj, altaroj...
6- Homamasiĝoj de kredantoj por revigligi la fidon: pilgrimadoj en Romo, Mekko, Jerusalemo...
7- Frua menso-trudo al la infanoj:
a) Kateĥismo, koranaj, katolikaj, judaj lernejoj
b) Preĝoj sugestitaj (por ne diri altruditaj) hejme, en lernejo, en preĝejo...
8- Valoraj ĝeneralaj principoj, plej ofte komunaj al ĉiuj religioj, sed bedaŭrinde...
9- Agoj tute malaj: fanatikismo (inkvizicio, ŝarjao), krucmilitoj ĉiuspecaj (kristanaj, Ĝihado), religiaj konfliktoj ĉie en la mondo (Irlando, Kosovo, ...)
10- Konvinko posedi la Veron.

Jean MARIN
9 rue Adrien Lejeune
93170 Bagnolet Francio

P.S.: Tiu ĉi teksto ne estas definitiva artikolo, sed simpla studo proponita al la legantoj de ***Ateismo***. Ĉiuj rimarkoj, kritikoj, korektoj, aldonoj, estos pli ol bonvenaj, necesaj kaj deziritaj.
Bonvolu sendi ilin al la ĉi supra adreso. Mi plej sincere antaŭtdankas ĉiujn sendontojn.

*Koncepto ellaborita de Greenberg en 1963. Vidu John Wells: ***Lingvistikaj aspektoj de Esperanto***, paĝon 12.

La profeto

La profeto diris sur la placo: «Post dudek jaroj la Sinjoro malsuprenvenos denove sur Teron, kaj regos justeco», sed la nekredantoj alkriis lin: «Estas tre facile antaŭvidi kio okazos post dudek jaroj. Kiu postulos klarigojn al vi se vi eraras?»

La profeto diris sur la placo: "Malbone komenciĝos la nova jarcento, ĉar la suno malheliĝos kaj estos po du noktoj tage", sed la nekredantoj alkriis lin: "Nu, estas tre facile anonci kio okazos en la jaro 2001ª. Kiu faros reklamacion al vi se vi eraras?"

La profeto diris sur la placo: "Post tri jaroj Tero faltiĝos kaj formiĝos novaj montetoj kaj kaboj, kaj meze de ebenaĵo apertos krateroj", sed la nekredantoj alkriis lin: "Estas triviale aŭguri tion, kio okazos post tri jaroj. Se via profetaĵo estos erara, kie ni trovos vin por vin ŝtonumi?"



Parto de *La profeto*, de Rubens.

Tiam la profeto, plu restante serena, diris sur la placo: "Post dek sekundoj, mi elmontros al vi mian langon", kaj antaŭ ol iu nekredanto spitinstigis lin, la profeto elmontris sian nenegeblan kaj nekontesteblan langon, profetitan kaj ruĝan.

Verkis

Mario Benedetti

(Urugvajo/1920-2009) en 1989

el la hispana tradukis

Christian Rivière

Se Dio ekzistus

Ne maloftas ke atestantoj de Jehovo, krome ĉarmaj najbaroj, frapas ĉe mia pordo, esperante min konverti.

Por respondi, mi tute ne kontestas iliajn kredojn, (male mi preferas akcepti ilin) por elmontri iliajn kontraŭdirojn.

Kaj, kiam ili diras al mi: «Kiam vi aperos antaŭ Dio...» mi respondas: «Mi ne scias kion li diros al mi, sed mi scias kion al li mi diros».

Sed, unue por ke io estu klara, ni estu precizigaj:

Se Dio vere estas Dio, li konas ne nur la estantecon, sed ankaŭ la estintecon kaj la estontecon.

Kiam li kreis la homon, li sciis kiujn abomenaĵojn (krimojn, militojn, torturojn, masakrojn) tiu ĉi estos kapabla. Kaj tamen li kreis lin, kaj ne nur li kreis lin, sed li kreis lin esence malbona por ke li fariĝu kulpa pri tiuj abomenaĵoj.

Ke oni ŝparigu al ni tiu mizeran argumenton pri la libereco lasita al la homo, lia destino estis skribita en tiu estonteco konata de Dio.

Kaj poste, kion Dio faris? Li sendis sian propran filon kaj kondamnis lin al morto en kruelegaj suferoj por pentofari siajn proprajn erarojn, siajn proprajn krimojn.

Kiel nomi tian konduton?

Plej bone, li ne estas Dio, kaj tio estas senkonscio.

Plej malbone, li estas Dio, ĉiopova kaj ĉioscia, kaj tio estas sadismo.

Jes, certe, se iu Dio ekzistas, kaj se mi aperos antaŭ li, mi havos multon por diri al li.

Jean MARIN



Racio kaj la ekesto de la universo

Mi legis kun intereso la artikolon de Nyegosh Dube en la lasta numero de ***Ateismo***: "Vojaĝo en la menson de la Kosma Kreinto". Per tiu artikolo la verkinto volas pruvi la neekziston de Dio per raciaj argumentoj. Mi tamen dubas pri la utilo de tiu aliro, kaj saman dubon mi havis legante la libron ***La dek du pruvoj pri neekzisto de Dio***, kiu estis anoncata en la sama numero.

Racia argumentado utilas nur se oni diskutas kun kontraŭulo, kiu argumentas laŭ la samaj reguloj. En sia artikolo, ekzemple, Dube demandas, "...kiamaniere iu ajn estaĵo, supernatura aŭ ne, povas krei energion ex nihilo (t.e. el nenio)? Ĉu la K.K. [Kosma Kreinto] povis simple per sia volo ekzistigi ĝin?" Al tiu demando fervora kredanto respondus simple "Jes". Tiel. Argumentoj kaj pruvoj ne necesus.

Kaj cetere, la sama argumento validas rilate al la Pra-Eksplodo mem. De kie venis la materio, kiu rezultis el ĝi? Ĉu ĝi venis el nenio? Kio ekzistis antaŭ la Pra-Eksplodo? Dirinte tion, mi tamen pretas kredi, ke la universo ekestis per la granda Pra-Eksplodo kaj ne per la interveno de iu supernatura estaĵo. Ĉar mi ne estas fakulo pri fiziko, mi mem ne kapablas kompreni la pruvojn, sed mi ja scias, ke ĉiuj seriozaj sciencistoj opinias, ke tiu Pra-Eksplodo okazis, kaj ke iliaj opinioj baziĝas sur logika kalkulado. Kaj cetere, oni rajtas supozi, ke la scienco pri la ekesto de la universo ne estus io facile komprenebla de homo, kiu ne aparte studis tiun fakon.

La pruvo pri la ekzisto de la Kosma Kreinto, aliflanke, troviĝas en libro verkita antaŭ 3000 jaroj de primitiva dezerta tribo kun malmulte da realaj scioj, sed kun granda fantazio. La fabeloj en tiu libro spegulas

ilian malvastan scion pri la planedo sur kiu ili vivis. La solaj bestoj por ili estis tiuj, kiuj vagis en la propra regiono; la solaj steloj estis tiuj, kiujn ili povis mem vidi sen la helpo de teleskopo. Kiel ili povis eĉ imagi la ekziston de koaloj aŭ ornitorinkoj, des malpli la nekoncepteblan vastecon de la kosmo aŭ la nenombreblajn miliardojn da steloj, kiuj konsistigas nian universon?

La malnova fabelo pri la kreado de ĉio en sep tagoj estis la provo de antikva popolo klarigi la ekeston de la mondo. Dum la postaj 3000 jaroj esploristoj iom post iom faris malkovrojn, kiuj ŝanĝis tiun tro simplan mondrigardon: oni ekkomprenis la relativan malgravecon de nia propra planedo kompare kun la suno; malkovris novajn bestojn en la suda duonsfero; trovis la restaĵojn de gigantaj, nekonataj bestoj, kiuj iam vivis sur Tero; ekkomprenis ke la mondo aĝas milionojn da jaroj, ne nur kelkajn milojn; konstatis, ke nia sunsistemo apartenas al tuta galaksio, kiu cetere estas nur unu inter miliardoj; kaj sciencistoj eĉ sukcesis kalkuli daton por la ekesto de nia universo.



Povus esti, kompreneble, ke estontaj sciencistoj per pli precizaj kalkuloj iam konstatos, ke la supozata dato de la Pra-Eksplodo estas malĝusta, aŭ eĉ ke la universo ekestis alimaniere. Sed ĝenerale la direkto de la esploroj estas al ĉiam pli detalaj kalkuloj kaj precizigo de la jamaj scioj, ne al kompleta forigo de la scioj jam akiritaj. Kaj kion ajn la estontaj sciencistoj malkovros, ili certe ne revenos malantaŭen por informi nin, ke la universo ekestis per simpla ordono de iu supernatura estaĵo.

Anna Löwenstein, Italujo



Ateismo

Bulteno de la Atea Tutmonda Esperanto Organizo (ATEO)



Notu, ke la apuda globo kaj supraj okulvitroj ne estas simboloj de ateismo aŭ nia asocio, sed propono rigardi mondon per pli praktika maniero, pere de nia magazino.

http://www.gazetotekolanti.com/ateo/a10.pdf

Enhavo

Kovrilo: Unukornulo, ĉu ĝi ekzistas?

Prezidanto: Christian Rivière, el Francio: christian.riviere@laposte.fr

Vicprezidanto: Dominique Simeone, el Francio.

Sekretario: Anna Lőwenstein, el Italio.

Kasisto: Dieter Rooke, el Svislando.

Estrarano: Yamasaki Seiko, el Japanio.

Redaktoro: Jesuo de las Heras, el Hispanio.

Jarkotizo: €15.
Konto ateo-y ĉe UEA

Tute verkita kaj kompilita per senpagaj linuksaj rimedoj: OpenOffice Writer, Gimp kaj Scribus.

Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.

ISSN 1697-6460